

Eugen Höfling,
Verda stelo

tradukita de N. N. 14

1. En tiu ĉi solena hor'
eksonas nia kanto,
por ke ekflamo ĉiu kor'
por nia Esperanto!
La lingvo, kiu ligas nin
kaj kiu kunfratigas nin,
por alta sankta celo
de nia verda stelo!

2. Amikoj, alten tenu vi
la signon de l'espero
neniam forgesante pri
la amo kaj la vero!
Ekĵuru, ke vi ĝis la mort',
eĉ dum plej malfeliĉa sort',
laboros por la celo
de nia verda stelo!

3. Fidelaj estu al la ĵur',
neniam flankiĝante,
ĉar ni per unueco nur
ekvenkos batalante!
Batalo ne timigu nin,
kontraŭe, ĉi freŝigu nin
por alta sankta celo
de nia verda stelo!

4. Se kiam foje vin labor'
tro forte vin lacigos,
memoru, ke plezura hor'
vin certe revivigos!
Ni estu tial gajaj nun,
eĉ se briladas nek la sun',
nek luno sur ĉielo:
Ekbrilu verda stelo!

...

5. Sed ankaŭ ne forgesu ni
la ĉarmajn virinetojn,
ĉar ili al la harmoni'
donacas la rozetojn!
Vivegu ĉiu belulin'
akompananta gaje nin
sur vojo al la celo
de nia verda stelo!

6. Kaj fine nun el tuta kor'
dum flirtas la standardo,
dum tintas glasoj laŭ la mor'
elkriu ni kun ardo:
Ĝis eterniĝos nia rond',
ĝis ruiniĝos nia mond'
vivegu nia celo,
vivegu verda stelo!

*Traduko de la Germana poemo "O alte Burschenherrlichkeit" de EUGEN HÖFLING (*1808 – †1880) en Esperanton de N. N. 14.*

Arg-44-926 (2008-10-05 22:35:21)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi kanton el la kajero "Kelkaj ŝatataj kantoj, eldonitaj de Kolding Esperanto Klub". Mi ricevis fotokopion de tiu kant-libreto de la dana samideano Lars Kromann. Li trovis tiun kant-libreton en la arkivo de la dana s-ano Gustav Kühlmann. La verkinto kaj la dato ne estis indikita. Estis notita nur, ke la kanto kanteblas laŭ la germana studenta kanto "O alte Burschenherrlichkeit".